

Verda Voĉo

INFORMA INSTRUA KAJ AMUZA BULTENO DE SOMERA ESPERANTO-KOLEGIO

En la jaro 1953 la kolegio okazis ne en Doksy, sed en la kastelo Kost. Ankaŭ Verda Voĉo ne estis eldonata, nur en 1954 aperis rememoroj pri la jaro 1953 en la januara Verda Voĉo. Ni kopias ilin sube:

Eĥo de sub la kastelo "Kost".

Bela aŭtuna dimanĉo! Ĉar la vetero ŝajnis favora, senhezite mi decidis entrepreni ekskurson en mezon de alloga naturo. Post la naŭa horo nia automobilo haltiĝis, ĉu vi scias kie? Rekte sub la kastelo „Kost” en la Ĉeĥa paradizo.

Jes! Ĉu povus esti pli inda loko ol tiu, kie denove la kolegianoj konvinkiĝis, ke nia kara lingvo enhavas daŭran potencon ligi homajn korojn al firma amikeco? Same, kiel dum la pasintaj jaroj en Doksy, ankaŭ sub la majesta historia kastelo „Kost” la geesperantistoj trovis ne sole ripozon, sed ankaŭ instruon kaj, kion mi plej alte taksas, scion, ke nia lingvo vivas, ke ĝi vivos ĉar homoj portas en siaj koroj neforigeblan volon kompreni unu ia alian!

Novaj adeptoj de nia lingvo konvinkiĝis pri altaj kvalitoj kaj seriozaj klopodoj de nia porpaca laboro kaj ili sentis sin inter ni feliĉaj. Ankaŭ la baroj inter esperantistoj kaj indiferentaj homoj kaj vilaĝanoj tie falis. Ili vidis, ke esperantistoj scias sin amuzi dece kaj konvene, kaj ĉefe la sincera amikeco, reganta en nia kolektivo, plaĉis al ili.

Unufraze ni povas esti kontentaj pri farita laboro, ĉar „Kost” estas preta kiam ajn gastigi esperantistojn! Malrapidpaŝe ni promenis tra la valo de sankta Prokopio. Multaj miaj rememoroj fuĝis ĝis al vi, vivantaj en lokoj malproksimaj. Ĉu ne tintis en viaj oreloj? Floroj sur herbejo jam forvelkis, tial mi ne povis kolekti bukedon por vi, sed la naturo, kredu, ne estis malpli bela ol tiam somere. Mankis nur viaj voĉoj sub la muĝantaj arbaroj!

Mi revenis kontenta kun scio, ke esperantistoj trovis sub la kastelo „Kost” novan hejmon.

Ŝo

Somera Esperanto-kolegio en Kost 1953.

Su-Se

Esperanta verda rondo,
a ty v čele milý Tondo,
loĝis sub kastelo Kost-
bylo nás tam tenkrát dost.
Ĉiuj gaje vivis kune,
i počasí bylo slunné,
iam eĉ ni banis nin,
skákali jsme do hlubin,
En la ĉarma suna brilo,
to se nám to vejletilo,
každý dělal, co se dalo,
tra la ĉeĥa paradiz'
každý běhal jako rys!
Por la bela sankta celo,
Esperanto aby znělo,
sub la flag' kun verda stel'
akuzativ každý dřel.

En la ĉarma ĉeĥa valo,
každý dělal co se dalo,
kaj klopodis instruist'
že neměl čas ani jíst.
Ĉar vi zorgis mem pri ĉio,
ty, náš drahý Antonio,
pro la nova verda id'
neměl ani v noci klid.
La lernantoj fartu bone -
proto nosil párky vonné,
post matena instruad',
každý míval hrozný hlad.
Oratoran kurson fari -
k tomu třeba hodně páry,
gvidi ĝin en granda stil'.
To ses, Tondo, zapotil!

Kiam venis la vespero,
a na zámek padlo ŝero,
ŝvitis vi pro la klopod',
spáchat program lidem vhod:
iam dancis ni en balo,
někdy se též čarovalo,
kaj ĉe tio kun gracil'
zpívali jsme ze všech sil.
Sed ĉe ĉiu nia movo
měls ty, Tondo, hlavní slovo -
kvankam lacis ĉiu ost',
věrné držels celou Kost.
Ĉio iam devas pasi -
vzpomeň na ty krásné časy.
En somera verda klas'
sejdeme se za rok zas!